



ANTAŭ DEK JAROJ APERIS LA UNUA NUMERO

# starto

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1978 · 5 · (69)

supera sukceso  
de la sportisto estas

VRCHOLNÝM

ÚSPĚCHEM  
SPORTOVCE



JSOU  
PŘESNÉ  
MODERNÍ  
HODINKY

*klenoty*

preciza \* \* moderna

► horloĝo



# K 10. NAROZENINÁM STARTA

Ano, právě před 10 lety obdrželi esperantisté v ČSSR prvé vydání STARTO. Bylo psáno s chutí a dobře, odpovědně a informovaně, i když sám časopis měl spíše formu a technickou úroveň oběžníku.

Již tehdy stál u jeho zrodu Oldřich KNÍČAL, redaktor a jazykový odborník, člověk oddaný progresivním myšlenkám esperantského hnutí a zároveň kritik. Již 10 let on i STARTO jsou neodmyslitelní od sebe.

STARTO za tento, pro časopis již poměrně mužný věk, prodělalo všechny nezbytné dětské nemoci i potíže v dospívání. Měnila se velikost i obsah, forma i rozsah. Měnil se okruh spolupracovníků i tiskárny.

Vždycky se však mohlo říci, že STARTO i "Olda" - chtěli "být u toho" když se něco dělo, nenechali své čtenáře klidně sedět, burcovali tam kde bylo třeba probudit, kritizovali co si kritiku zasloužilo, ale také uměli pochválit a povzbudit, připomenout a usměrnit a pobavit či poučit.

Je to hodně práce, stovky hodin dobrovolně věnovaných, aby každý z nás dostal včas časopis na stůl. Važme si jí a věřím, že společně s vámi mohu říci: "Zůstanete stále s námi." A díky vám oběma za to co děláte. Velice si vás vážíme!

Z. Křimský, tajemník

---



La unua vicprezidanto de Ŝtata Konsilantaro de Bulgara PR P. Tančev (maldekstre) akceptas donacon de Ĉeĥa Esperanto - Asocio, o La solenan inauguron de la kongreso partoprenis la ĝenerala konsulo de ĈSSR en Varna A. Kamenický (meze) kaj L. Vanková el ministerio de kulturo. Dekstre sekretario de ĈEA Z. Křimský (vidu la fotojn sur la kovrilo).

---

# gong



Speciální prací prostředek

Perle jemně, potlačuje plstnatění vlny a uchovává  vlněné výrobky co nejdéle pružně a pěkně. Je vhodný pro praní vlněného a jemnějšího  prádla i úpletů z kadřavých syntetických vláken

**Rakona**

# ESPERANTISTA PACMOVADO ENIRAS

## LA DUAN KVARONJARCENTON

Mondpaca Esperantista Movado (MEM) estas nur kvar jarojn malpli aĝa ol la pacmovado generala, kies elstaraj agantoj favore rilatis al la klopodoj de MEM. Tiu ĉi konstato volas atentigi pri unu fundamenta vivkondiĉo por MEM, nome pri ĝia strikta ligiteco kun la tutmonda organizita movado por la paco. La paco estis delonge nur servo, sed nun ĝi fariĝis reala kaj atingebla celo, kondiĉe, ke ĉiuj ĝiaj adeptoj komune klopodos atingi ĝin. Tiu sama ideo instigis ankaŭ la fondiĝon de MEM en 1953.

La kunfondintoj kaj unuaj gvidantoj de tiu ĉi movado, Rudolf Burda el Ĉeĥoslovakio kaj Anton Balague, hispano vivanta en Aŭstrio, perfekte konsciis, ke la plej universala movado de la nuntempo prezentas sufiĉe da eblecoj por la adeptoj de Esperanto, samantaj la pacan mision de la Zamenhofa lingvo. Ili kaj iliaj sekvantoj en la fruntaj pozicioj de MEM konstante apelaciis al esperantistoj-pacamikoj pri la daŭra kunlaboro kun landaj pacmovadoj por kiel eble plej multe etendigi la agadsferon de MEM ekster la Esperantan medion.

Tiu ĉi kunlaboro baldaŭ rezultigis, ke ankaŭ malgranda taĉmento, kia MEM estas, povas kunrikolti sukcesojn de la grandmasa kolektivo, nome de la universala pacmovado, se ĝi agadas konforme al ties programo kaj celo.

Kaj MEM efektive agadis. En la lastaj jaroj Monda Paĉkonsilantaro rekonis ĝin sia aktiva membro, kiu subtenas ĝiajn iniciatojn, partoprenas en la batalo por la senarmigo kaj malstreĉiĝo, por la europa sekureco kaj alvokas esperantistojn aligi al tiuj ĉi konkretaj devizoj.

Pluraj esperantistaj asocioj konsideras aktivecon de la respektivaj MEM-sekcioj kiel fundamentan kontribuon de la enlanda Esperanto-movado por la socio. Nature, ĉar pri siaj perspektivaj gajnoj ĝi povas decidi per sia senpera partopreno en la socia vivo.

Samtempe oni ne povas preteratenti, kiel substrekis ankaŭ la ĉijara generala konferenco de MEM en Varna, ke necesas akcenti la taskon amasigi kiel eble plej multe da esperantistoj por la komuna agado kun neesperantistaj porpacaj organizoj kaj movadoj. Ni devas tiamaniere kontribui por la pli alta prestiĝo de la internacia Esperanto-movado, atingi ĝian plenan subtenon fare de tiuj ĉi organizoj.

Antaŭ dudek kvin jaroj la juna pacmovado helpis MEM en ĝia impeto, nun estas la vico de MEM helpi per Esperanto interkompreniĝon de ĉiuj amikoj de la paco.

(kni)

# (( (( (( ( KONTRAKTO ) ) ) ) ) )

pri amikeco kaj kunlaboro inter

Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
Prago

Asocio de esperantistoj en SSR  
Bratislava

kaj

la esperantistoj organizitaj en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko.

## § 1

Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de esperantistoj en SSR, reprezentitaj per Kunordiga komitato por kunlaboro inter ambaŭ asocioj kaj la esperantistoj organizitaj en Kulturligo de GDR, reprezentitaj per sia centra komitato

- aktive partoprenas konstruadon de la evoluanta socialisma socio en siaj landoj, elirante al similaj kondiĉoj kaj eblecoj,
- akcentas sian volon kaj preparitecon utiligi Esperanton por la socio surbaze de la Fina Akto de Helsinko, kunlabori por firmigo de la paco kaj kunlaboro en Eŭropo kaj en la tuta mondo,
- esprimante sian kontenton pri la profundigantaj kaj firmigantaj amikeco kaj kunlaboro inter Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko kaj Germana Demokratia Respubliko,
- decidis entrepreni helpe de Esperanto kaj en strikta kunlaboro kun siaj organizitaj membroj de ĉiuj kontraktantaj respublikoj konkretajn paŝojn por plifirmigo kaj pliprofundigo de la amikeco kaj proksimigo de la popoloj de ambaŭ ŝtatoj
- kaj tial subskribas tiun ĉi kontrakton pri amikeco kaj kunlaboro.

## § 2

La kontraktantoj decidis, ke la gvidantaj kaj subordigitaj organoj de iliaj organizoj

- regule interŝanĝos spertojn kaj opiniojn pri la problemoj de la internacia kaj naciaj Esperanto-movadoj kun la celo solvadi komunajn taskojn,
- garantios kaj realigos komunajn taskojn kaj agadojn sur ĉiuj administraj niveloj.

## § 3

La komuna agado inkluzivas i.a.:

- realigon de aktiveco (ekspozicioj, prelegoj, renkontiĝoj) kiu plibonigos la reciprokecon konon de la rezultoj atingitaj en la konstruado de la socialismo, precipe en la kultura sfero,

- kunlaboron sur la kampo de la esperantista junulara movado,
- plialtigon de la idea nivelo de la membroj, precipe teori-an, lingvan kaj fakan preparon de bonkvalitaj instruistoj, lerniloj, teoriaj materialoj pri Esperanto k.a.,
- kunlaboron sur la kampoj de la interlingvistiko kaj espe-rantologio kun la celo prepari sciencajn materialojn kaj dokumentojn surbaze de la principoj de la marksismo-leninismo,
- la reciprokecan popularigon kaj interesanĝon de la esperant-lingvaj publikaĵoj kaj aliaj materialoj eldonitaj en la respektivaj landoj.

#### § 4

La kontrakto donas elementan bazon por la kunlaboro inter ĉiuj organizoj, kiuj subskribas tiun ĉi dokumenton. La deta-loj estas fiksitaj en la ĉiujaraj plenumaj protokoloj ella-borataj de la estraroj de la respektivaj organizoj ĝis la fi-no de majo kaj subskribataj fine de septembro por la sekvan-ta kalendara jaro.

#### § 5

Ambaŭ organoj konatigos kaj ekaplikos la enhavon de la kontrakto, la manierojn kaj kondiĉojn de ties realigo al siaj subordigitaj komponentoj, por kies reciprokaj kontraktoj pri kunlaboro la enhavo de tiu ĉi estas observenda. La kon-trakto kaj ĉiujaraj plenumaj protokoloj estas fiksitaj en agadplanoj de ĉiuj organizoj.

#### § 6

La kontrakto kaj ĉiujaraj plenumaj protokoloj estas kon-sultataj antaŭ la subskribo kun la kompetentaj organoj de la respektivaj landoj, kiuj direktas la organizojn subskriban-tajn tiun ĉi kontrakton.

#### § 7

La kontrakton kaj ĉiujarajn plenumajn protokolojn oni po-vas ŝanĝi aŭ kompletigi laŭ la deziro de iu ajn partnero, ko-ndiĉe, ke la ceteraj kontraktantoj kun tio konsentos.

#### § 8

Tiu ĉi kontrakto kaj ĉiujaraj plenumaj protokoloj estos pretigitaj en Esperanto, la ĉeĥa kaj germana lingvoj. Ĉiuj tekstoj havas la saman validecon. La Esperanta teksto de la kontrakto estos publikigita en la presorganoj de ambaŭ kon-traktantoj.

Por Kunordiga komitato de ĈEA kaj AE SSR: Jozefo Vítek, p.m.  
prezidanto

Por la esperantistoj organizitaj  
en Kulturligo de GDR:

Rudolf Hahlbohm, p.m.  
prezidanto

## ■ FILATELA RENKONTIĜO EN HAVÍŘOV ■ ■ ■

La sekcio ESPERANTO ĉe Asocio de Ĉefaj Filatelistoj organizis meze de majo jam la 7an renkontiĝon en kadro de la ĝemeliga ekspozicio de poŝtmarkoj Ostrava-Katowice en Havířov. Inter la programeroj oni menciis interkonan vesperon, ĝeneralan kunvenon, prelegon "Kiel prepari filatelan ekspozicion je la temo Esperanto" de V.Vána, viziton al la internacia filatela ekspozicio.

La sekcia prezidanto V. Hasala dum la inaŭguro de la ĝenerala kunveno tralegis salutleterojn, inter kiuj eksterordinaran eĥon renkontis tiu de J.Vítek, la prezidanto de ĈEA. Solenan fermon de la renkontiĝo partoprenis la asocia vicprezidanto D. Kočvara.

Utilan propagandon de la internacia lingvo inter la vizitintoj de la ekspozicio faris kvin ekspoziciaĵoj je la temo Esperanto. Ankaŭ tiamaniere do realigas kunlaboro inter ĈEA kaj Asocio de Ĉefaj Filatelistoj. Per siaj ekspoziciaĵoj partoprenis V.Vána, kiu gajnis grandan orumitan medalon, A. Jakubec - grandan argentumitan medalon kaj J.Hadámeček - grandan bronзан medalon.

(ajak)

**SANĜO POR KOLEKTANTOJ.** La ESPERANTO sekcio ĉe Asocio de Ĉefaj Filatelistoj publikigas en sia lasta informilo desegnaĵojn de porokazaj Esperanto-poŝtstampoj el 1976 kaj atentigas i.a. pri la Tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj PRAGA 1978 (8.-17.9.), al kiu oni konsentis akcepti tri ekspoziciaĵojn pri Esp.-o. Ni atentigas krome niajn legantojn pri la ebleco aboni la informilon kaj membriĝi al la Asocio, kun kiu ĈEA subskribis sistampe interkonsenton pri kunlaboro.



## NOMBROJ PRI LANĜOV



El la tre detala kaj per multaj ciferoj dokumentita raporto pri la 2a kaj 3a etapo de la cifara Somera Esperanto-Tendaro en Lančov ni elektis kelkajn informojn:

La duan etapon (16.-29.7.) partoprenis entute 87 gekursanoj en kvar kursoj (A,B,C,D), 10 instruistoj kaj 8 tendarestaranoj. Plej multaj gelnantoj estis el ĈSSR (82) kaj Jugoslavio (16), kvin esperantistoj venis el Pollando, du el GDR.

La trian etapon (30.7.-12.8.) partoprenis sume 127 personoj. Plej multaj eksterlandanoj estis el Hungario (20) kaj GDR (15).

Inter la distraj programeroj dum ambaŭ etapoj estis ekz. ekskursoj al Vranov, Bitov, Třebíč ka., jugoslavia vespero, tendarfajro kun la hungara grupo, prelego pri la 63a UK kaj TEJO-kongreso kaj diversaj konkursoj. La SET-anoj povis ricevi verdajn, argentajn kaj orajn insignojn, se ili parolis dum unu, du aŭ pli da tagoj nur Esperante.

La 10an de aŭgusto vizitis la tendaron reprezentantoj de la distrikto Třebíč.



# ESCEPTOJ EN ESPERANTO

En la regula planlingvo Esperanto tamen ekzistas pluraj esceptoj el la absoluta reguleco. Ili ekzistas en la lingvo jam dekomence, parte enkondukitaj de la aŭtoro mem, parte kontrabanditaj en la internacian lingvon el etnaj lingvoj, kaj sankciitaj de la lingvonormigaj fundamentaj verkoj aŭ de pli poste aperintaj duonoficialaj verkoj kiel la Plena Grammatiko, Plena Vortaro kaj Plena Ilustrita Vortaro. Unuj el ĉi esceptoj estas senĝenaj aŭ ĉe certgrade porcelaj, nuancigaj kaj do ricigaj por la lingvo, aliaj estas ĝenaj, ĉar ili estas duĝenaj, ja havas ĉe du kontraŭajn sencojn, kaj povas kaŭzi ĉe gravan miskomprenon kaj konfuzon. Ni observu iujn el la ambau kategorioj.

Inter la unuaj, senĝenaj, tolerindaj kaj siacelo utilaj, ni konsideru tiajn inversencajn vortojn, por kiuj Zamenhof mem por la malaj nocioj lasis apartajn vortojn, kiel ekz. komenci - fini, aŭ enkondukis apud la mal-formoj kiel maldolca, malĝojigi, malsukcesi, malutili radikvortojn kaj kreis duopojn: dolca - amara, ĝojigi - aflikti, stulta - sprita, sukcesi - fiaski, utili - noci, ofta - rara, spari - disipi ktp. Ĉe pluaj aŭtoroj de gravaj vortaroj, ekz. Plena Vortaro, Parnasa Gvidlibro, Plena Ilustrita Vortaro, oni trovas pluajn tiajn sinonimojn por plej ofte uzataj nocioj, kiel ekz. kurta /mallonga/, dura /malmola/, tarda /malfrua/, softa /mallauta/, frida /malvarma/, fora, lontana /malproksima/, poka /malmulte/ k.s. Uzĝo de tiuj vortoj, jam preskaŭ neprave nomataj neologismoj, ĉar ili en la lingvo hejmas plejparte 40 - 50 jarojn, estas pravigebla per tri motivoj: 1) Ili liveras sinonimojn aŭ preskaŭsinonimojn por oftege uzataj komunlingvaj nocioj, same kiel ilin posedas la naciaj lingvoj, kaj ebligas adekvate malplatige redoni tradukojn de riceprimaj beletraj verkoj, 2) ili liveras pli mallongajn, plejparte du-silabajn vortojn tiel necesajn ĉe tradukoj kaj verkado de poeziaj kaj muzikaj tekstoj, 3) ili prezentaj ankaŭ novajn rimvortojn. Ili estis komence konsiderataj kiel poeziaj fak-esprimoj, sed multaj el ili transiris pro sento de bezono jam en la komunuzan lingvon (fora, kurtendoj ks.). Sed ili neniam forkondamnau aŭ elpusu la utiligan prefikson "mal". Ja male, poeto darfu ekuzi surprizacele kaj fresefike ĉe la nekutimaĝojn: malfini, malkomenci, malrara, malfrida ks.

Alia ĝis escepto estas la pseŭdoadverba uzo de prepozicioj ĉirkaŭ kaj ĝis en jenaj frazoj: "La soldatoj ricevis ĝis plenan sakojn da terpomoj kaj du panojn". "Al la infanoj oni donis ĉirkaŭ kilogramojn da pomoj". "Ĉiu ricevis ĝis cent kronojn". "Oni ricevis ĉirkaŭ tian sumon, kian oni bezonis".

Ĉie ĉi tie havas la prepzicioj ĉirkaŭ kaj ĝis funkcion de adverbo en senso "preskaŭ, preksimume", kaj devus propre teksti ĉirkaŭe, ĝise. Ĉi tiuj esceptoj estas neniel ĝenaj, samkiel iuj esceptoj ĉe la absoluta fonetika prononcado. Ni konas ja la asigligon de vocaj kaj senvocaj konsonantoj, la aperon de duonaŭdebla "j" en hiatoj, kiam al la vokalo "i" najbaras alia vokalo. Ankaŭ aserto, ke en Esperanto ne ekzi-

estas duoblaj konsonantoj en la vortradikoj havas esceptojn: Ĉu venos Anna? Ĉu estos ana kunveno? Ŝi ne estas Emma. Ŝi ne estas ema. Nian klubon vizitis finno. La fino estas proksima. Gallo estis praloganto de Francujo. Lia galo estas malsana. K.s. Ĉi tie ni distingas du malsamajn nociojn kaj per skribo, kaj per kurtigo de la akcentita vokalo laŭ la regulo, ke la akcentita vokalo antaŭ du konsonantoj (el kiuj la dua ne estas likvido r aŭ l), estas kurta.

Mi povas citi ankoraŭ kelkajn neĝenajn kaj ne miskomprenigajn esceptojn. Sed nun ni observu la duan kategorion de esceptoj mallogikaj, ĝenaj.

Sur la unuan lokon mi metus la du kontraŭajn sencojn ĉe la negacio de la verbo "devi". Laŭ PV kaj PIV estas sankciita la mallogika kaj escepta senco, laŭ kiu "ne devas" signifas "devas ne...". Tiel "Mi ne devas labori" signifas: estas al mi malpermesite labori. Bone. Sed laŭ la regulo: "ne" staras senpere antaŭ la vorto, kiun trafas la negacio, multaj komprenas logike "mi ne devas..." kiel "mi ne havas devon...", analoge kiel mi ne povas - mi ne havas povon, ne emas - ĝe havas emon, ne bezonas - ne havas bezonon ktp. Jes, malgraŭ, ke tiun escepton enkondukis Zamenhof kaj ke ĝin citas la PIV. Uzi por "ne devi" en la logika senco "ne havi devon" Zamenhof preferis "ne bezonas". Sed estas neniel neglektebla diferenco inter "ne devi" kaj "ne bezoni". Bezoni - havi bezonon fontas iel el la subjekto, propra sento. Devi - havi devon povas veni kaj el la subjekto, kaj, ja eĉ pli, el ekstera faktoro. Uzado de "ne devi" estas do defendebla en ambaŭ sencoj, kaj tiel ĝi estas fakte ankaŭ uzata en literaturo kaj en lernolibroj. Por eviti tiun dusencecon ja eĉ kontraŭsencecon, oni proponis jam antaŭ jardekoj verbon "darfi", kies nea formo "ne darfas" anstataŭ la arkaikigontan formon "ne devi" en la Zamenhofsenco "ne havi permesitecon". La verbon darfi uzadas pluraj bonaj aŭtoroj, enhavas ĝin ankaŭ ĉiuj ĝenaj kaj slovakaĵ E-vortaroj el la lastaj jardekoj. Sed ial ĝin konsideris nebezona la PV kaj PIV. Tie listita "licj" estas tauga nur por uzo sensubjekta. Por eviti la kontraŭsencecon de la du uzoj de "ne devi" prezentigas pluraj manieroj:

Mi devas ne trinki alkoholaĵojn, aŭ  
Mi ne rajtas trinki alkoholaĵojn (tamen tio signifas, ke mi ne havas rajton!) aŭ  
Ne licas, ke mi trinku alkoholaĵojn aŭ, kaj plej trafe  
Mi ne darfas trinki alkoholaĵojn.

De jen kvar variantoj por esprimi sin precize kaj unusence. Elektro sufiĉa eĉ por la kontraŭuloj de la tauga verbo "darfi". Espereble en la reeldonoj de la PIV aŭ ĝia suplemento aperos ankaŭ tiaj uzataj vortoj kiel darfi, burgo (mezepoka fortikigita kastelo), kaj kelkaj aliaj.

Ĝena estas ankaŭ uzado de prepozicio "trans" kun loksango foje kun akuzativo, foje sen akuzativo. Ekz. en Zamenhofaj frazoj: "Pensoj iras trans limo sen pago kaj timo". "La hirundo flugis trans la riveron..." Ĉar se "Prepozicio" trans montras lokon aŭ spacon kuantan pli malproksime ol, kaj iel dividitan disde la objekto, kiun ĝi enkondukas", ĉe loksango

devus sekvi akuzativo, por evitigi miskomprenon. Tiel ĝi estas ankau nuntempe preskau senescepte uzata. Por senakuzativa uzo de loksango ofte uzblas prepozicio "tra": "Pensoj iras tra limo...", iam alia prepozicio: snuro pendis super la korto. Eĉ kiam la loksango estas nur kyazaua, taugas akuzativo: "Knabino saltadis trans la svingsnuron".

Ni vidas, ke en tiaj ĉi miskomprenigaj esceptoj, eĉ se defendeblaj kiel Zamenhofaj kaj fundamentaj, ni elektu kaj plu uzadu la pli logikan, unusencan, nemiskomprenblan kaj pli gustan manieron. La alia farigos ne eraro, sed poiome arkaikaĵo.

Jiří Kořínek

## FERVOJISTA KONFERENCO

La konferenco de Fervojistaj Sekcio de CEA okazis la 26an de agosto en Havířov. La partoprenantoj aŭdis i.a. prelegon pri la urbo kaj fakprelegon pri elektraj pelveturiloj. Oni sendis salutoleterojn al ministro de trafiko kaj al la sindikata asocio, akcentante en ili, ke la esperantistaj fervojistoj

uzos la internacian lingvon por faka pliperfektigo de sia laboro kaj por la interkomprenigo kaj amikeco inter la popoloj.

La konferenca traktado estis viglilita per kultura arango; anoj de la EK en Havířov prezentis kelkajn kantojn kaj poemojn de P. Bezruč en la ĉeĥa kaj Esperanto.

(to)

MINISTR DOPRAVY  
ČESKOSLOVENSKÉ SOCIALISTICKÉ REPUBLIKY

V Praze dne 14. září 1978  
Č.j.: 97/78 - SM/OTP

Vážení přátelé!

Děkuji vám za pozdrav zasláný při příležitosti konání celostátní konference Českého esperantského svazu a ujištění o vaší pomoci při zajišťování náročných úkolů železniční dopravy.

V tomto vašem úsilí na pracovištích i na poli vaší zájmové činnosti vám přeji mnoho dalších úspěchů.

Se soudružským pozdravem

Český esperantský svaz  
sekce železničářská  
Jitlská 10

110 00 Praha 1

# BRAZILA KRONIKO



INFORMILO  
DE  
BRAZILA  
ESPERANTO  
-LIGO



## Unua Latin-Amerika Esperanto-Kongreso - sukcesa okazaĵo!

La brazilaj organizoj kunlaboris. UEA kaj la latin-amerikaj movadoj helpis kaj partoprenis. Wilson Martins organizis kaj prezidis. Amarílio Carvalho reĝisoris. Kaj la Unua Latin-Amerika Esperanto-Kongreso okazinta en la brazila urbo Marilja (17/22 julio) estis vera sukceso.

Ĝi ne estis perfekte glata kaj laŭplana evento, ĉar tiaj eventoj tre malofte okazas en la Tria Mondo. Tial estis malakurateco kaj diversaj teknikaj mankoj. Tamen la rezulto estis SUKCESO, kaj tio estas la grava punkto.

Enskribiĝis 419 partoprenantoj el 11 landoj. Du urbestroj kaj pluraj aliaj politikistoj ne nur apogis, sed ankaŭ partoprenis plurajn partojn de la programo. La urbestro de Marilja, d-ro Theobaldo de O. Lyrio, estis honora prezidanto de la LAEK. La urbestro de Bauru', d-ro Osvaldo Sbeghén,

gastigis la kongresanojn en postkongresa vizito. Kaj ambaŭ legis salutvortojn en perfekta Esperanto.

Estis scienco kaj arto; amuzo kaj laborkunvenoj; katolika Diservo kaj spiritisma renkontiĝo; alparolo de veteranoj kaj partopreno de gejunuloj; prezentadoj de temoj faritaj kaj de brazilanoj kaj de eksterlandanoj. Estis ŝakludado, kanzonfestivalo, sciencaj eksperimentoj sur podio, teatroludado, filmprezentado kaj ĉiam kaj ĉie vasta uzado de la internacia lingvo. Oni lanĉis la libron Esperanto en Antaŭjuĝoj de Walter Francini. Aperis la unua foto-romano en Esperanto, Enuo, direktita de Lima Cipolatti. UEA profitis la okazon por kunvenigi la estrojn de la latin-amerikaj landaj organizoj por pritrakti la plifortigon de la landaj movadoj kaj la plivastigon de la anaro. Kaj la tri prezidantoj de la brazilaj landaj asocioj subskribis kune leteron pri kunlaboro. Oni pristudos la eblecon havi la duan LAEK en Argentino, en 1980.

Ni esperas, ke ĝi estu tiel sukcesa kiel la unua.



**ZÁVODY NA KULIČKOVÁ LOŽISKA, národní podnik,  
KLÁŠTEREC NAD OHŘÍ**

**nositel vyznamenání „ZA VYNIKAJÍCÍ PRÁCI“**

JE SOUČÁSTÍ TRUSTU LOŽIS-  
KOVÉHO PRŮMYSLU V ČSSR.  
VYRÁBÍ VELKÝ SORTIMENT KU-  
LIČKOVÝCH LOŽISEK NAKLÁ-  
PĚCÍCH, DVOURÁDÝCH KULIČ-  
KOVÝCH LOŽISEK S KOSO-  
ÚHLÝM STYKEM, AXIÁLNÍCH  
LOŽISEK JEDNO- I OBOU-  
SMĚRNÝCH A JEDNORÁDÝCH  
KULIČKOVÝCH LOŽISEK RA-

DIÁLNÍCH, DALE ŠIROKÝ ŠOR-  
TIMENT KULIČEK JAK PRO  
VLASTNÍ POTŘEBU, TAK I PRO  
OSTATNÍ VÝROBCE V ČSSR.  
ZNAČKA ZKL, VYRAŽENÁ NA  
ČELECH LOŽISEK, REPREZEN-  
TUJE DOMA I V MNOHA  
ZEMÍCH SVĚTA TRADICI,  
KVALITU A POCTIVOU PRÁ-  
CI MNOHA STOVEK LIDI.

**NACIA ENTREPRENO**



**KLÁŠTEREC NAD OHŘÍ**

VE SVÝCH PROVOZECH

EN SIAJ PRODUKTEJOJ

KLÁŠTEREC NAD OHŘÍ

MODŘICE U BRNA

KLÁŠTEREC NAD ORLICÍ

BOHDÍKOV

TEPLICE V ČECHÁCH

**V Y R Á B Í**

**F A B R I K A S**

- |  |   |
|--|---|
| * korunkové uzávěry na láhve                 | * kronajn botelkapsulojn                              |
| * závitové uzávěry na láhve                  | * šraubkenelajn botelkapsulojn                        |
| AL - KORK                                    | AL - KORK   |
| * korkové sátky všech velikostí              | * korkajn ŝtopilojn de ĉiuj dimensioj                 |
| * těsnění pro letecký a automobilový průmysl | * ŝtopgarnaĵojn por la avia kaj automobila industrioj |
| * korkové parkety a lišty                    | * korkajn parĝeterojn kaj listelojn                   |
| * leštící korkové kotouče                    | * korkajn polurdiskojn                                |

Dekdu ĉapitroj pri la sindefendo (suplemento)

La aŭtoroj: Ing. J. Novák kaj Ing. I. Špička

La desegnistojn faris: L. Špaček

#### 1.1.1. La movoj fare de la batanta brako

La batanta brako estas pretumita ĉe la dekstra akselo (fig. 12b). El tiu ĉi preĵuro ĝia pugno komencas moviĝi rekte frapcelen. Dum tiu ĉi movo la antaŭbrako de la batanta brako pronas (por ke la batanta pugno estu firmigita en la momento de trafo frapcelen). La finan pozicion de la brako rilate al la trunko de la batanto kaj al la frapcelo vidu sur la fig. 13b,c; la manplato de la batanta pugno montras malsupren. La frapsurfaco vidu sur la fig. 14a-e.

#### 1.1.2. La movo fare de la retroiranta brako

La movo fare de la retroiranta brako kaj tiu de la brako batanta kulminu samtempe. La retromovo fare de la nebatanta brako plifaciligas la trunkorotacion (dum la movo de la batanta brako frapcelen), fine de la bato ĝi helpas firmaigi la trunkon.

La kubuto de la retroiranta brako moviĝas rekte malantaŭen preter la maldekstra kokso. Dum tiu ĉi movo oni supinas la antaŭbrakon de la retroiranta brako kaj pugnigas la manon. Fine de la bato la retroiranta brako situas en la sama pozicio kiel la batanta antaŭ la komenco de la bato.

#### 1.1.3. La trunkorotacio

La trunko moviĝas kiel unu firma tuto, t.e. la akso X (fig. 13) trapasanta la koksojn estas senĉese sub la akso, kiu trapasas la ŝultrojn. La komenca trunk-pozicio estas montrita sur la fig. 13a, la fina sur la fig. 13b,c. La trunkorotacion oni efektive plu rapide, subite kaj forte. Tiun ĉi movon bremsu ne muskoloj de la propra korpo de la batanto, sed ekkontaktiĝo de la frapsurfaco de la batanta brako kun la frapcelo. Alie la kineta energio, prezentata per tiu ĉi movo, ne povas esti transformita fine de la bato en la misformlaboron en frapcelo. Sekve la bato estus malpli peza aŭ eĉ senfika.

La akso, ĉirkaŭ kiu la trunko rotacias, povas trapasi (proksimume) la vertebraron (fig. 13b) aŭ laŭlonge de ĝi la ŝultron de la nebatanta brako (fig. 13c). Tio estas ekstremaj kazoj. La unua maniero estas pli facile efektivebla, la dua ebligas atingi pli grandan inertmomenton, tial teorie ankaŭ pli grandan pezon de la bato.

Rotaciigante la trunkon oni premu la maldekstran genuon internen, neniam inverse!

#### 1.1.4. Translacio fare de la trunko

La translacio fare de la trunko direktiĝas frapcelen. Ĝi estas prezentata per translukiĝo de la pezcentro proksimume je 5 - 10 cm. Oni efektiveblas ĝin per ago de la gambo, troviĝanta pli diste for de la frapcelo (ĉe la elektita rektmanfrapo temas pri la ~~sama~~ gambo al la batanta brako).

Ellerni priskribitan translacion ne estas facile. Sekve ni rekomendas instrui pri ĝi nur tre altnivelajn disĉiplojn. La rektmanfrapo estas sufiĉe peza eĉ sen ĝi. Ĉi-loke ni atentigas pri tiu ĉi translacio nur por kompletigi la informojn.

#### 1.1.5. Forta elspiro

Korrekta kunordigon de ĉiuj muskoloj, kies laboro prezentas la rektmanfrapon, oni ne povas atingi sen samtempa rapida kaj forta elspiro. Ĝia efiko estas dupeca. Dum moviĝo de la frapsurfaco celen ĝi eb-




Fig.13




Fig.14




Fig.15



ligas efektiviĝi la baton kiel eble plej rapide. Kiam la batalanto estas finbatanta, la menciita elspiro plifaciligas firmigon de lia korpo. Sen tiu ĉi firmigo la bato estas malpli efika aŭ senefika. Oni elspiru buŝe. En reala batalo oni elspiras kutime kun samtempa ekkrizo.

#### 1.1.6. Kunordigo de ĉiuj batkonsistaĵoj

La frapsurfaco devas trafi la celon en la momento, kiam la rapideco de ĉiuj movoj, kiuj la baton prezentas, estas maksimuma. La forta elspiro en tiu ĉi momento finiĝas. La angulo inter la rekto, trapasanta la ŝultrojn kaj la pugnon de la batanta brako, kaj la rekto, trapasanta ambaŭ ŝultrojn, estu proksimume  $90^\circ$ . Alie oni ne povas optimume utiligi en la bato la kinetan energion de la rotacianta trunko. Se la menciita angulo estas  $180^\circ$ , la trunkorotacio ne plu povas influŝi la pezon de la bato per sia kineta energio. Pri la optimuma angulo inter la humero (1) kaj la antaŭbrako ni ankoraŭ parolos.

Perfekte kunordigo de la pli supre menciitaj movoj, konsistigantaj la elektitan rektmanfrapon, estas ebla nur kaze de la korekta korpoteno de la batanto.

Ni priskribis la elektitan rektmanfrapon, efektivigitan sen antaŭa translukiĝo de la batanto. Certe ne estas necese akcenti, ke tiu ĉi batalago ne estas facile ellernebla. Majstra ekregado de ĝi daŭras 10 - 15 jarojn da ĉiutaga ekzercado. Tamen oni povas ellerni jam post 2 - 3 jaroj efektivigon de la rektmanfrapo dum 0,17 - 0,18 s tiel peze, ke libervole rezistema homo trafita per ĝi sur korektan trafendan lokon, estas senkonsciigita. Tio por la praktiko kutime sufiĉas.

#### 1.2. Meĥanismo de la rektmanfrapoj

Ekleptikon pri la meĥanismo de la rektmanfrapoj ni komencu ĉe la plej gravaj manieroj de realigo de la movo fare de la frapsurfaco celen laŭ rekto.

##### 1.2.1. Movoj fare de la batanta brako

La movoj, kiujn efektiviĝas unuopaj partoj de la frapanta membro, servas antaŭ ĉio por ke la frapsurfaco atingu maksimuman rapidecon en la momento de la ekkontaktiĝo kun la frapcelo. La kineta energio, kiun la movo prezentas, estas fine de la frapo en la frapcelo transformata en misformlaboron, ĝi do rilatas al pezo de la frapo. La ĵus praparolitajn movojn ni nomas ĉefaj frapmovoj.

Krom la ĉefaj frapmovoj ofte funkcias en frapoj ankoraŭ aliaj, kies rolo estas diferenca; ili ekzemple direktas la frapsurfacon celen, ebligas firmigi frapsurfacojn, diversajn korpopartojn, ktp. Ilin ni nomas helmsaj frapmovoj.

Nun ni priskribos ĉefajn frapmovojn de la plej gravaj rektmanfrapoj.

##### 1.2.1.1. Ĉefaj frapmovoj en la rektmanfrapo

Estu  $K_1$  antaŭbrako,  $K_2$  humero,  $S_1$  kubutartiko kaj  $S_2$  ŝultro. Eksterme de  $K_1$  estas frapsurfaco U. Ĉio videblas sur la fig.15a.

Estu ebena  $\mathcal{C}_0$ , en kiu kuŝas  $K_1$ ,  $K_2$ , U kaj frapcelo C dum bato, orta al subbazo, sur kiu la batanto staras. Ĉi-kaze oni povas la movon fare de la frapsurfaco celen laŭ la rekto realigi plej simple tiel, ke  $K_2$  turniĝas ĉirkaŭ la akso  $a_2$  en plusa direkto (fig.15b) (tiu ĉi akso pasas tra  $S_2$  kaj estas orta al  $\mathcal{C}_0$ ), dum  $K_1$  turniĝas ĉirkaŭ analoga akso  $a_1$  en la mala direkto ( $a_1$  trapasas  $S_1$  kaj estas ankaŭ orta al la  $\mathcal{C}_0$ ). Angulaj rapidecoj  $\omega_1$  kaj  $\omega_2$  de  $K_1$  kaj  $K_2$ , eventuale la anguloj, kiujn devas la antaŭbrako ( $\alpha_1$ ) aŭ la humero ( $\alpha_2$ ) trapasi antaŭ U trafos celen, devas esti oportune elektitaj, alie la movo fare de U laŭ la rekto ne estas realigebla.




Fig.16



Fig.17

Ni nomu ĵus priskribitan manieron de efektivigo de la rekta movo de U celen la t.n. unua meĥanismo de la movo fare de la batanta brako en la rektmanfrapo.

Se la batanta brako estas pretumite laŭ fig.16, la ebena  $\mathcal{C}_1$ , en kiu kuŝas K, K, kaj U, povas rotacii ĉirkaŭ la akso  $s_2$  pasanta tra la ŝultro kaj la koksio (proksimume) de la batanto. Ĵus menciita movo fare de la ebena  $\mathcal{C}_1$  servas parte ankaŭ por pligrandigo de pezo de la bato, ne temas do pri nura helpa frapmovo. Tio estas la t.n. dua meĥanismo de la movo fare de la batanta brako en la rektmanfrapo (se estos el la kunteksto klare, ke temas pri la meĥanismo de la movo fare de la batanta brako, ni plue simple uzos la terminojn unua aŭ la dua meĥanismo de la rektmanfrapo).


